# Michèle kaj Hubert



Michèle estas 67 jaraĝa kaj mi men 71. Ni ambaŭ bonfartas.

Michèle estas instruistino. Ŝi komencis karieron kiel ĝenerala sekretario, sed kiam ni edziĝis en 72, ŝi restis hejme sep jaroj por eduki niajn infanojn. Poste, ŝi instruis la anglan kaj nederlandan dum 30 jaroj.

Hubert estas civila inĝeniero. Li laboris 25 jarojn ĉe ACEC (elektra konstruofirmao) kiel inĝeniero: esploroj, desegnoj, investoj, kaj registrado.

Poste li laboris dum 10 jaroj kiel konsilinĝeniero por malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj en Valonujo (novaj teknologioj kaj registrado). Kiel ekstra laborposteno, li ankaŭ instruis kiel profesoro en fakultatoj por industria inĝenieristiko kaj kontado. Li prenis fruan emeritiĝon en 1997.
Ekde kelkaj jaroj, Hubert praktikas libertempajn metiojn: ligno kaj metalarto. En 2009 li komencis ĝardenkultivadon. En 2013 kaj 2014, li plibonigis sian sperton en la konstruado de retpaĝaroj.

Krom la familio, nia ĉefa komuna intereso estas Esperanto, kiun ni komencis lerni en 2004. Ĉi tiu fokuso ebligas nin multe vojaĝi, kaj fari novajn amikojn.

En 2014 ni komencis lerni "simpligitan ĉinan lingvon".

Ĉi tiu kvalifiko tute ne taŭgas ĉar la prononco kaj la skribo estas TRE KOMPLIKAJ!

# Niaj geinfanoj

Ni geedziĝis en 1972, kaj havas tri infanojn kaj ok genepojn.



## La sportistoj

Gwendoline estas 41 jaraĝa kaj instruas korpan edukadon. Kun Benoît, ili havas du infanojn: unu knabinon Laly (8 jaraĝa) kaj unu knabon Sacha (6 jaraĝa). Benoît estas instruisto pri skiado dum la skisezono (Franca SkiadoLernejo en Alpe d'Huez Francio), kaj estras ŝat-okup-bazaron HUBO en Belgio dum la cetero de la jaro.



## La intelektuloj

Dominique estas 40 jaraĝa kaj estas civila inĝeniero. Li laboras por Siemens. Li havas tri filojn: Jean (19 jaroj), Tristan (14 jaroj) kaj Jeanne (9 jaroj).
Lia kunulino Silvia Martínez havas du infanoj: Henry (12), Alex (9 jaroj)



## La romantikuloj

Laurent estas 34 jaraĝa kaj estas softvarinĝeniero. Li laboras en Bruselo por StepStone. Lia edzino Julie estas instruistino en infanĝardeno.
Ili havas tri infanojn: Zoé (7 jaraĝa) kaj Clément (5 jaraĝa), kaj Emy (3 jaraĝa).



Hubert – Michèle

**Les enfants – De kinderen – The children – La gefiloj - 孩子们 Háizimen**
**Laurent, Dominique, Gwendoline.**

